

n-ro 73

julio 2001

La Merkato

ISSN 0941-9306

IKEF dum la UK en Zagrebo

Ĝenerala Kunveno de IKEF

Okazos je ĵaŭdo, 26 julio, 12.30 - 14.00 h en salono D. Maruzzi (troviĝas en la ĉefa kongresejo FER - Fakultato de Elektrotekniko kaj Komputado)

Aliaj vizitoj

Estas planita vizito al la Komerca Ĉambro je vendredo 27 julio, 13.30 h. Eble ni ankaŭ vizitos iun fabrikon, sed pri tio ni ne povis fiksi daton; i.a. dependas de aliaj programeroj (ekzemple IKEF-membroj kiuj devas ĉeesti komitatkunsidojn) kaj de la lokaj eblecoj.

Detalajn informojn vi ricevos surloke en la komuna budo de IKEF, Monato kaj Flandra Esperanto-Ligo.

fjb

Enhavo

Raporto pri komuna seminario IKEF/TAKE en Storckensohn	3
Anoncitaj aranĝoj - Spezokonto-bilanco	4
Novaj membroj	5
Komercaj petoj kaj proponoj - Eŭroĉekoj malaperos	6-7
Ĉina tradicia medicino - Ĉina Radio - Sŭahila vortaro	8
Mallonga superrigardo de la internacia patent-sistemo	10-17
IKEF-Laborplano 1998-2003	18-19

La Merkato (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Wang Tianyi

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoŝtanco) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Buselo): numero 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB)

Perantoj

Internacie: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, reto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

Hungario: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapeŝt XIII

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikō, J-185-0014 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

Sukcesa unua komuna seminario de IKEF kaj TAKE en Storckensohn

Nova paŝo de la kunlaborado inter la du fakaj asocioj IKEF kaj TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) estas farita. Kiel en 2000 planite kaj plurfoje anoncite (lastfoje en La Merkato n-ro 72, paĝo 16), la unua komuna seminario de ambaŭ asocioj okazis kadre de la ĉiujara "Staĝo de Parolata Esperanto" de la Orientfranca Esperanto-Federacio, ĉi-jare en montarvilaĝo Storckensohn (suda Alzaco, orienta Francio) je 20-22 aprilo 2001.

IKEF kaj TAKE tiam interkonsentis, ke tiaj seminarioj estu prefere organizataj kadre de aliaj esperantistaj aranĝoj. Per tio ni alparolas pli grandan aŭskultantaron ol nur la proprajn membrojn. Tia opinio praviĝis en Storckensohn. Kvankam la nombro de aliĝintoj (81) atingis preskaŭ precize la kalkulitan nombron (80), troviĝis inter tiuj nur 10 IKEF-membroj (el tio kvin estraranoj) kaj 13 TAKE-membroj. Tamen en la prelegsalono ĉiam ĉeestis pli ol 30 personoj; la ceteraj samtempe aliĉambre partoprenis en lingvokursoj por komencantoj, progresantoj kaj praktikantoj.

La organizintoj de staĝo kaj seminario meritas laŭdon, precipe André GROSSMANN kaj Roberto KUENY. Pri la distra parto zorgis la itala kantisto Gianfranco MOLLE kaj la deklamisto Roberto. Diapozitivon pri Laponio montris Raita PYHÄLÄ. Vizito de muelejo produktanta juglandan oleon fermis la aranĝon.

Entute oni prezentis 10 prelegojn el la fakoj de IKEF kaj TAKE. Jen la prelegintoj kaj siaj temoj:

Peter den BEEMS	Pri konstruado de polderoj en Nederlando
Peter den BEEMS	Farboj kaj koloroj
Franz Josef BRAUN	E-komerco (Komerco per la reto)
André GROSSMANN	Esperanto kaj ties literoj en komputilo kaj en la reto
Peter HAUSER	Tekniko pri varmigo de ŝtalo
KÖNYVES Zoltán	"EVG"-konstruado kaj ĝia elektra muntaĵsistemo
Robert KUENY	Kemio por nutraĵo
D-ro Rainer KURZ	Memortekniko
Fabien VAN MOOK	Terminologio en (kaj ekster) Esperantujo
Violette WALTER	Spertoj el staĝo en ĉina komerca firmao

En la organo de TAKE, la revuo "LA DOMO", numero 31 de julio 2001, pri ĉiu prelego aperas resumo. Por fari al niaj membroj eksterordinaran servon, la estraro de IKEF decidis, ke ĉiu membro ricevu aldona al "La Merkato" n-ro 73 de julio 2001, senkoste "LA DOMO"n n-ro 31 enhavantan tiujn resumojn. Per tio niaj membroj havas la oportunojn postlegi la esencon de la prelegoj el la komuna seminario de IKEF kaj TAKE.

IKEF kaj TAKE ankaŭ estonte planas pliintensigi la kunlaboron.

Franz Josef Braun, prezidanto

Anoncitaj aranĝoj

Mardo 17 - vendredo 20 julio 2001, Sofio, Bulgario: Internacia scienc-praktika seminario 'Utiligo de Esperanto en la komerco, turismo kaj interhomaj rilatoj'. Post la seminario eblas komuna trajnvojaĝo per dormvagono al UK. Informoj: Centro Espero, bul. Al. Stambolijski 52, 1303 Sofio, Bulgario; fakso 00-35-92-987847, reto centroespero(a)hotmail.com.

Sabato 20 oktobro 2001, Gent, Belgio: Esperanto kaj Ideologioj. Informoj: Jacques Schram, Hof ter Bekestraat 49, B-2018 Antwerpen; rete <j.schram(a)skynet.be>, http://travel.to/studtago; fakso +32-9-2278664.

Aprilo 2002, Sankt-Peterburgo (Rusio), Centro de medicina profilaktiko:

11a Internacia Scienc-Praktika Konferenco

BANLOKOJ, EKOLOGIO, KLERIGADO

Sekcioj: BANLOKOJ KAJ RESANIGADO; EKOLOGIO KAJ TURISMO; KLERIGADO KAJ ENTREPRENADO. Detaloj pri la lasta sekcio:

- problemoj de ekonomio, manaĝado kaj merkato en sanator-banloka afero
- preparo de personalo
- modeloj de manaĝado de ekonomio kaj personalo
- informistemoj
- organizado de reklamo
- problemoj de sekureco

Sekciestro: MATUSOV Jurij Aleksandroviĉ, prezidanto de administracio de la Centro de subteno de sciencaj esploroj, Sankt-Peterburgo, katedrestro pri rekreacio en Baltia internacia instituto de turismo, doktoro pri pedagogiaj sciencoj.

Sintezoj de raportoj estos bonvenaj ĝis 31.01.2002 en la rusa lingvo kaj Esperanto. (Petu la teknikajn detalojn de la informadreso). Ni planas ke dum la konferenco laborlingvoj estos la rusa lingvo kaj Esperanto. Informoj: fakse: (812) 264-36-68; rete: bmit(a)mail.wplus.net (kun indiko: por prof. Matusov).

Spezokonto-bilancio: la revizoro aprobis

En la antaŭa numero de La Merkato estis menciite ke la estraro ankoraŭ atendis la aprobon de la revizoro. Intertempe evidentiĝis ke la revizoro ĝustatempe sendis sian aprobon, sed ke ĝi ie survoje perdiĝis.

Donacoj

La kasisto dankas pro la donacoj ricevitaj dum la pasinta jaro de la membroj Lee (11): 42,60 EUR kaj König (54): 5,00 EUR.

Nova adreso

73. Prof. LEE Chong-Yeong, Shinsega Town Apt. 5-1001, Soodung-Dong, TAEGU, Koreio, 706-031; retadreso: Lee(a)esperanto.net (kelkaj etaj korektoj al adreso kiu aperis en LM72)

Novaj membroj

309. S-ro William R. HARMON, 2389 Thackeray Drive, OAKLAND, CA 94611, Usono, retadreso <wrharmon(a)aol.com>

310. S-ro ZHANG Changsheng, 148 Heping South Road, Agricultural Bank of China, Changzhou Branch, CN-213003 Changzhou, Jiangsu, China; °1956; banka oficisto (vicestro de departemento); tel: +86-519-8108444 (O), fakso: +86-519-8123000, tel: +86-519-8823-39 (H), mobila: +86-130-04430825, retadreso <zhchsh(a)public.cz.js.cn>

311. S-ro Shaban HASANI, Lagje 6, Pallati 63, KUKES, Albanio, t+f (0)242.23.79 - (0)242.30.35, mobila (0)38.20.37.242, retadreso <shhasani(a)albbmail.com>

Aŭtomata pago de IKEF-kotizo

IKEF-membroj kiuj havas konton ĉe FEL (Flandra Esperanto-Ligo) povas doni skriban instrukcion al FEL por ĉiujare aŭtomate pagi sian IKEF-kotizon (10 aŭ 15 eŭroj, depende de la lando) de sia FEL-konto (kondiĉe ke estas sufiĉe da bonhavo en ĝi) al IKEF.

Nacia/enlanda produkto

Nuntempe cirkulas du indikiloj de la riĉeco de iu lando: 'brutta (aŭ malneta) nacia produkto', 'BNP' (angle: 'gross national product', 'GNP') kaj 'malneta enlanda produkto', 'MEP' (angle: 'gross domestic product', 'GDP'). La nacilingvaj tradukoj (ekz. en sveda kaj germana) ofte estas konfuzigaj kaj pro tio ambaŭ esprimoj estas intermiksitaj.

'GNP' egalas al 'GDP' PLUS labor- kaj kapitalenspezoj ricevitaj de eksterlando, MINUS tiaj enspezoj senditaj al eksterlando. Praktike, la diferenco inter ambaŭ estas malgranda. 'GDP', 'MEP', 'malneta enlanda produkto' estas tutmonde uzata de ekonomikistoj ekde ĉ. 1990 kaj tial preferinda.

BS/RR

Komercaj petoj kaj proponoj

Ĉinio

Altkvalitaj logaĵoj kun okuloj faritaj el mola plasto kaj diversaj fiŝhokoj. S-ro Zhang Changsheng, 61-3 Ma Jia Cun, Tian Ning Qu, Changzhou, Jiangsu 213014; telefono /fakso: 86-519-8823391, rete: zhchsh(a)changzhou.cngb.com; http://www.china116.com.

La ĉinaj Changbaishan-a Ginsengo-brando kaj la Ginsengocervokorno-brando estas du eliksiroj, fortikigaj tonikoj por homa korpo. La ĉinaj ginsengoj de kiu specoj estas multaj, havas Changbaishan-Ginsengon, Xiyang-Ginsengon, Gaoli-Ginsengon, Bai-Ginsengon, Rugh-Ginsengon... Tiuj igas korpon bona kaj fortigas homan fizikon. Interesitoj rete aŭ fakte kontaktu min. S-ro Chen Jinyin (Chen Dinsu) (IKEF 203), CN-730060, xigu lintao-jie 304-Chang Tuiguan-ban lanhua 4-Huodon-zhongxin Lanzhou Gansu; reto: chenjinyin123(a)yahoo.com.cn, fakso:+0086-0931-7557601.

Invito

Changzhou-a Esperanto Asocio kun Changzhou Ruilong Net Businss and Trade Co., Ltd., sincere invitas alilandajn esperantistajn komercistojn kaj ekonomikistojn, kiuj interesiĝas pri komercado kaj investo en nia urbo Changzhou, kaj deziras viziti, esplori kaj intertrakti en nia urbo Changzhou. Ni povos provizi elspezojn dum 4-5 tagoj en nia urbo (inkluzivas tranoktajn, manĝajn kaj trafikilajn).

Se vi volus scii detalojn kaj havus proponojn bonvolu kontakti kun s-ro Zhang Changsheng (IKEF 310), tel: +86 519 8108444 (tage), 8823391 (nokte), fakso: +86 519 8114295, retadreso: zhchsh(a)public.cz.js.cn; poŝtadreso: 1104 Heping Masion, Changzhou 213003, Jiangsu, Ĉinio.

Pri Urbo Changzhou

Changzhou, situanta en centro de ĉinaj famaj urboj Shanghai kaj Nanjing, apud Yangzi Rivero, estas antikva kultura kaj industrie disvolviĝanta urbo. En ĝi troviĝas ruino de antikva urbo kaj moderna dinosaŭra fosilia parko. La urbo havas 4375 km² kaj 3.410.000 loĝantojn. Changzhou havas facilecan trafikajn vojojn kiuj estas altrapida vojo, fervojo, aeralinio kaj granda kanalo tra la urbo. Najbaraj urboj estas famaj turismaj urboj Wuxi, Suzhou kaj Zhenjiang. En la lastaj jaroj changzhoua registaro varme subtenas urbajn entreprenojn per industria kaj imposta politikoj kaj kodoj por disvastigi eksportajn kaj importajn komercojn kaj por aktive enkonduki alilandajn investojn. Ni varme kaj sincere invitas niajn amikojn viziti en nia urbo.

Francio/Hungario

Abonasoft estas franca-hungara firmaeto kiu produktas komputilajn programojn, kiuj, krom kelkaj naciaj lingvoj, ankaŭ uzas Esperanton.

Adreso: Thierry [tjeri] SALOMON, Bakáts utca 1/3 III 1, HU-1093 Budapest.

<http://abonasoft.tsx.org>, [rete.abonasoft\(a\)mail.com](mailto:rete.abonasoft(a)mail.com), telefono +36 1 217 3912.

Honkongo/Japanio

Thai Shing Int'l Ltd., Honkongo, fondis novan kompanion en Japanio: "Shunten Printempo Entrepreno, Limigita Partnereco", kiu okupiĝos pri:

- 1) Japana enlanda transportado per malpezaj aŭtoj
- 2) Konsilado pri internaciaj transportadoj kaj komercoj
- 3) Agrikultura produktado kaj vendado
- 4) Importo kaj eksporto de agrikulturaj produktaĵoj

S-ro Yasuharu MAEDA, Shunten Printempo Enterprises Limited Partnership,

Thai Shing Int'l Ltd. Japan Rep. Office, 165-1 Kamishiraki, Gyokuto-machi,

Tamana-gun, Kumamoto pref., 869-0313 Japan; fakso +81-968-85-3998;

HK WebFax: +852-2900-3396; rete <[printempo\(a\)nifty.com](mailto:printempo(a)nifty.com)>

Kolombio

Mi produktas fruktaĵojn (marmeladojn) el ekzotikaj tropikaj fruktoj de Kolombio (Sudameriko) kaj deziras eksporti ilin.

Konsultu la TTT-ejojn: <http://vidfruit.7p.com/>, <http://vidfruit.8k.com>

kaj <http://www.geocities.com/vidfruit/>. Rikardo Carrillo, <[rcarrilloc\(a\)yahoo.com](mailto:rcarrilloc(a)yahoo.com)>.

Pollando

Novfondita etfirmao "Esperanto-dom" okupiĝanta pri konstruado de domoj en sia agado pretas kaj volas uzi ankaŭ Esperanton. Koresponda adreso: pk. 76, PL-32-650 Kety. Reta SMS: +48607290228(a)text.plugsm.pl.

Eŭroĉekoj malaperos

Dum la nuna jaro unu lando post la alia nuligos la garantion de la eŭroĉeko-sistemo, kiu ekzistas ekde la jaro 1968 en Eŭropo kaj kelkaj najbaraj landoj. La bankoj ne plu liveras novajn ĉekojn al sia klientoj. Ekde la 1a de januaro la Maestro-kartoj anstataŭos la eŭroĉeko-kartojn. Per ili eblas uzi 600.000 mondistribuiĵojn en 77 landojn kaj pagi elektronike en 5 milionoj da vendejoj tutmonde.

Medicinaĵoj de Tradicia Ĉina Medicino (TĈM)

Kiel vi scias, nuntempe en Ĉinio ekzistas medicinaĵ-fabrikejoj kiuj produktas multajn specojn da medicinaĵoj, i.a. TĈM. Tiuj produktoj havas tri avantaĝojn: bonan kvaliton, racian prezon kaj neanstataŭeblecon. Multaj fabrikejoj jam akiris la aprobon de GMP laŭ la internaciaj normoj kaj la aprobon de usona FDA.

La fabrikejoj tre volas vastigi merkatojn aŭ trovi novajn merkatojn. La TĈM nur produktiĝas en Ĉinio kaj havas specialan efikon kontraŭ kormalsanoj, cerb-sanguj-malsanoj, alta sangpremo, ktp., kiuj estas malfacilaj por kuracado tra moderna medicino. TĈM estas pli sekura, ĉar estas tute el la naturaj drogoj.

Mi estas farmaciisto (majstro de farmakologio). Mi kaj nia kompanio povos pontiĝi inter vi kaj la medicinaĵ-fabrikejoj en Ĉinio. Ni povos rekte konigi aŭ rekomendi al vi la produktojn bonajn.

Nia adreso: Yonghonglu 15-hao, CN-230061 Hefei, Anhui; rete <[wds5698\(a\)21cn.com](mailto:wds5698(a)21cn.com)>.

d-ro Cheng Guoliang

Ĉina Radio Internacia: 60 jara

Je la 3a de decembro 2001 Ĉina Radio festos la 60an datrevon de sia fondiĝo. Je tiu okazo ĝi organizas konkurson inter la 14a de majo kaj la 30a de decembro. Jen la horaroj:

Horo (UTC)	regionoj	ondoj (m)	kHz
11:00-11:30	Japanio, Koreio	41,84; 25,16	7170; 11925
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25,75; 19,72	11650; 15210
20:00-20:30	Eŭropo	25,58; 30,11; 25,40	11730; 9965; 11810
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30,43; 25,64	9860; 11700

Sŭahila vortaro

Mi estas redaktanta grandan retan Esperanto-Sŭahilan Vortaron. Kiuj povas/volas kunlabori bonvolu kontakti min aŭ simple trafoliumi ĝin ĉe <http://kamusi.vessella.net> kaj sendi al mi komentojn. Nino; <[nino\(a\)vessella.it](mailto:nino(a)vessella.it)>; <http://www.vessella.it>; corso di lingua swahili; <http://corsoswahili.vessella.net>; Jifunze lugha ya Kiesperanto; <http://kiesperanto.vessella.net>; <http://kamusi.vessella.net>

Unua Premio 'Delfi Dalmau' por gazeta artikolo

Regularo (parta)

1.-Oni aljuĝos ĉi tiun premion al la plej bona populariga gazeta artikolo kiu pritraktos ajnan aspekton en rilato al la ekologio de la lingvoj, la lingva (mal)egaleco, la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj aŭ la ebla aŭ fakta kontribuo de internacia lingvo kiel Esperanto sur ĉi tiu kampo.

2.-Oni rajtas prezenti konkursaĵojn en la kataluna kaj/aŭ en Esperanto...

3.-La tekstoj ampleksos minimume tri kaj maksimume kvar foliojn DIN A4...

4.-La monsumo de la premio estos 300 eŭroj...

6.-La limdato por la akcepto de originaloj estos la 15a de aŭgusto 2001...

8.-Oni proklamos la rezulton en la kadro de la Kataluna Kongreso de Esperanto en Girona, dimanĉon la 14an de oktobro 2001.

Petu la kompletan regularon de: Hektor Alos i Font <halos(a)ctv.es>

(ret-info)

Kotizpagoj

Bonvolu rigardi la jaron ĝis kiam via kotizo validas sur la adresetiko. Se estas 2000, tio signifas ke mi ne registris vian kotizon por la nuna jaro. Se estas 1999, signifas ke ankaŭ la kotizo de la pasinta jaro mankas. Tamen, je dato de forsendo de ĉi tiu revuo mi ne havis aktualajn konteltirojn, do eblas ke pago farita antaŭ kelkaj monatoj ne estas registrita. Dankon pro rapida reago!

La Kasisto <rotsaert(a)xs4all.be>

Israela Esperantisto: gazeto interesa kaj leginda

- Esperanto-novaĵoj el Israelo kaj la mondo
- Artikoloj pri Israelaj kaj judaj temoj
- Lingvaj diskutoj
- Originalaj kaj tradukitaj beletraj verkoj
- Recenzoj pri novaj libroj
- Anoncoj de dezirantoj korespondi, ktp.

Du numeroj jare. Abonkotizo estas 8 usonaj dolaroj, pageblaj al UEA, konto elia-q de ELI (Esperanto-Ligo en Israelo).

Mallonga superrigardo de la internacia patent-sistemo

Enkonduko

Jam de pluraj jaroj Eŭropa Unio klopodas krei 'eŭropan patenton'. Ankaŭ en Esperantujo okazis diskutoj pri tio, i.a. en la revuo *Monato*, 11/2000, p. 11.

Ĉar je tiu okazo mi konstatis ke mi kaj miaj gekolegoj apenaŭ ion scias pri patentoj, mi decidis esplori la temon kaj verki ĉi tiun bazan klarigon. Mia ĉefa informfonto estis la anglalingvaj 'proceedings' (libroforme eldonitaj raporto) de la 5a Eŭropa Kongreso pri Patentoj, PATINNOVA/EPIDOS, okazinta en oktobro 1999 en Halkidiki, Grekio (EU, 1990, ISBN 92 894 0116 8). Aldone mi uzis la nederlandlingvan libron 'Octrooien' (Kluwer, 1987, ISBN 90 6321 442 1).

La PATINNOVA-libro (441 p.) estis komence de 2001 senpage havebla je <innovation(a)cec.eu.int>; eble restas ekzempleroj. Multaj dokumentoj ankaŭ estas je dispono interrete en .pdf-formato je www.cordis.lu/patinnova99.

La adreso www.european-patent-office.org estas, malgraŭ la longa nomo, tre efika elirpunkto por akiri pli da informoj pri patentoj kaj por atingi ĉiuspecajn aliajn organizojn. Oficialaj lingvoj estas angla, germana kaj franca. Foje estas informoj en itala kaj hispana.

Roland ROTSAERT

Difino de patento

Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro (1974) donas jenan difinon: 'La ekskluziva rajto (monopolo), apliki inventon de nova produkto aŭ nova procedo, aŭ apliki novan plibonigon de produkto aŭ procedo'. Plena Ilustrita Vortaro (1970) klarigas: 'Dokumento, per kiu ŝtato donas al inventinto monopolon (ordinare kun templimo), por ekspluati sian inventaĵon'.

Difino laŭ Microsoft Encarta 98-enciklopedio estas:

(angle) 'A legal document granted by the government giving an inventor the exclusive right to make, use, and sell an invention for a specified number of years.'

(traduko) 'Leĝa dokumento, donita de la registaro, donanta al inventinto la ekskluzivan rajton por produkti, uzi kaj vendi inventon dum difinita nombro da jaroj.'

La esperanta radiko egalas al angla kaj germana esprimoj. En la franca oni uzas 'brevet' (mallongigo de 'brevet d'invention'). En Nederlando kaj nederlandlingva parto de Belgio estas uzata tute malsamaspekta vorto 'octrooi' (ankaŭ skribita 'oktrooi'). Ĝia origino troveblas, pere de la malnova franca, en la latina vorto 'authentica', simila al esperanta

'aŭtoritato'. En Belgio la tri vortoj kunekzistas, sed malmultaj scias ke ili estas sinonimoj.

La tri radikoj referencas al iama kutimo en Eŭropo (ĝis 1789, la Franca Revolucio) ke regantoj transdonis, kontraŭ pago, la ekskluzivan rajton je io. Tio povis esti ekspluato de inventaĵo, sed ankaŭ konstruo de muelilo aŭ enkasigo de imposto.

Intelektaj rajtoj

Patentoj estas nur unu grupo el la t.n. 'intelektaj kaj industriaj propretoj'. Aliaj estas komercaj nomoj, markoj, desegnaĵoj, modeloj, plantraĵoj kaj kopirajtoj. Ĉiuj tiaj rajtoj havas sian propran landan leĝaron, plimalpli internacie kunordigitan. Pri la registrado de tiuj rajtoj en ĉiuj landoj kompetentas malsamaj instancoj. Nur kelkloke unu sola instanco respondecas pri ĉiuj registraĵoj de kaj ĉiuj informoj pri ĉiuj entreprenoj (ekzemple la Sveda Patent- kaj Registradoficejo, www.prv.se).

Kun Interreto venis novaj protektendaj rajtoj: la 'domain'-nomoj, la kopirajto de tekstoj, bildoj, muziko... cirkulantaj interrete.

Kial patento estas bezonata?

Inventisto (ĉu individua persono, ĉu esploristo(j) en entrepreno) kutime investis multon por ellabori novan procedon kaj deziras iel profitigi la investon. Per patento li ricevas ekskluzivan rajton por ekspluati sian inventon dum limigita periodo (ĝenerale 10 ĝis 20 jaroj). Patento nur validas en unu lando. Se protekto en alia lando estas dezirata, necesas plenumi la formalizaĵojn ankaŭ en tiu lando.

Inventisto ne nepre devas ekspluati la inventon protektitan de patento. Eblas transdoni la rajton (per vendo aŭ licenco) al alia persono aŭ entrepreno kiu havas pli da kapabloj por profitdome uzi ĝin.

Estas neniu devo por protekti inventon per patento. Inventinto rajtas simple uzi la inventaĵon en sia entrepreno, esperante ke neniu rivalo ekscios pri ĝi (kaj eble mem protektos la saman procedon). Tiel li ŝparas la kostojn de la proceduro.

Ankaŭ eblas ke inventinto libervole publikigas la rezulton de siaj esploroj kaj tiel igas ĝin nepatentebla. Imageblas diversaj kialoj por tia malavareco kiu donas al ĉiuj la rajton uzi la inventon:

-
- memfido de la inventinto ke li, estanta unue kaj havanta la plej grandan sperton, rapide akaparos konsiderindan parton de nove kreita merkato (la persona komputilo de IBM, 1980);
 - la deziro utili al la socio (la lingvo Esperanto, la komputila mastruma sistemo Linux).

Originoj de la patent-proceduro

La plej malnovan patentan leĝon kiun mi trovis estas el 1641 kaj rilatas al produktado de salo en Massachussets (Usono). Tamen, tio verŝajne ne koncernis inventon laŭ la nuna koncepto, sed - kiel tiutempe okazis en Eŭropo - la ekskluzivan rajton ekspluati konatan procedon en iu regiono.

La 'modemaj' patentregulaj alvenis kun la industria revolucio en la 19a jarcento (kreo de la usona patentoficejo, 1836; unua leĝo en Nederlando 1817, en Belgio 1854). Ankaŭ estis la epoko de la mondaj ekspozicioj: la unua okazis en Londono en 1851. Samtempe kun la monda ekspozicio en Vieno (1873) okazis internacia kongreso pri patentoj. Ekstis bezono je internacia regularo. Unua estis la Konvencio de Parizo (1883). Poste sekvis multaj novaj kaj kompletigaj internaciaj traktatoj. Listo de la ĉefaj sekvas fine.

Dum la pasintaj jardekoj ĉiuj landoj adaptis sian patentregularon al internaciiginta ekonomia situacio. En la iamaj komunismaj landoj ekzistis tute alia sistemo. Ĉinio kiel unua lando de tiu grupo kreis modernan patentregularon kaj serĉsistemon ellaboritan kun helpo de franca entrepreno Questel-Orbit. Multaj orienteŭropaj landoj baldaŭ aliĝos al Eŭropa Patent-Organizaĵo (aŭ eble tuj al nova eŭropunia organizaĵo, se tiu rapide establiĝos).

La eŭropa situacio

Por kompreni la nunan eŭropan sistemon (Eŭropa Patent-Oficejo en München, Germanio, kun filioj en Den Haag/Rijswijk, Nederlando kaj Vieno, Aŭstrio) necesas iom reiri en la historio.

Post la dua mondmilito sentiĝis bezono je internacia informcentro pri patentoj. Decido pri adjudiko por realigi tion okazis nur en 1965. Adjudikantoj estas la Respubliko Aŭstrio, Institut International des Brevets (IIB) el Nederlando¹ kaj Derwent, privata brita kompanio. La taskon ricevis Aŭstrio, kiu kreis por tio komercan entreprenon, nuntempe konatan kiel INPADOC.

¹ Mi ne trovis informojn pri tiu instituto. Konsiderante la francan nomon ĝi verŝajne originas el 19a aŭ frua 20a jarcento. Nederlanda ekonomia historiisto G. Doorman e. 1950 verkis plurajn librojn pri historio de patentoj, sed mi ne sukcesis konsulti ilin.

En 1973 la Eŭropa Patent-Organizaĵo (EPO) estis kreita kun sidejo en München, Germanio (urbo kie ankaŭ estas la sidejo de la germana patentoficejo). Ĝi ne estas instanco de la Eŭropa Unio (kvankam EU-membroŝtatoj estis inter la fondintoj kaj EU influas la mastrumadon). Celo estis plifaciligi kaj unuecigi la registradon de patentoj. Eblas registri per ĝi patentojn en ĉiuj aliĝintaj ŝtatoj, indikitaj de la patentpetanto. En 1999 estis 19 aliĝintoj kaj en 2002 aldoniĝis 8 orienteŭropaj landoj. Pluraj aliaj sekvos.

En 1988-1992 INPADOC integriĝis en EPO kaj nun, ankoraŭ en Vieno, funkcias kiel inform- kaj edukcentro de EPO. Nederlanda IIB ricevis - en cirkonstancoj kiujn mi ne retrovis - la taskon esplori la novecon de patentpetoj kiuj alvenas ĉe EPO.

Jam en 1975 Traktato de Luksemburgo kreis la bazon de eŭropunia patento, kiu aŭtomate validos en tuta Eŭropa Unio. Tamen, la efektiviĝo de tiu projekto ankoraŭ daŭras. Lastatempe estas forta premo por disponi pri EU-patento kaj la preparo de la necesa regularo estas nun en fina fazo.

Helpantoj de patentpetanto necesas

Kvankam teorie eblas ke inventisto mem vizitas la landan patentoficejon, praktike estas bezonata granda sperto por sukcese plenumi la necesajn formalizaĵojn. Grandaj entreprenoj havas sian propran sekcion kiu okupiĝas pri tio. Malgrandaj entreprenoj aŭ individuuloj devas konsulti specialiston (patentagentejon) por kontroli ĉu la invento vere estas nova, por verki kaj traduki la informojn pri la inventoj en taŭga formo, por konsili pri la landoj kie registrado estas plej oportuna, ktp.

Agentejoj estas troveblaj en telefonlibro. Ofte la landaj patentoficejoj disponigas liston de oficiale rekonitaj agentejoj. Ne estas unueca nomo por tiu profesio. Kelkaj ekzemploj: mandataire agréé, conseil en brevet (france); patent attorney, authorized representative (angle); Patentanwalt, zugelassener Vertreter (germane); octrooigemachtigde (nederlande).

Ankaŭ agentejoj kaj grandaj entreprenoj ne mem ĉion faras. Kelkaj specialigitaj privataj entreprenoj (Derwent, Questel Orbit...) kreis grandegajn, facile traserĉeblajn datumbazojn kies enhavon ili metas - kontraŭ pago - je dispono de interesitoj.

Ankaŭ ekzistas specialaj foiroj dum kiuj la specialistoj ofertas siajn servojn, ekzemple:

- INPEX, Pittsburgh, Usono, 16-20 majo 2001 (www.inventionshow.com)
- 3ips (Ideas, Innovation and Intellectual Property Services), Leuven, Belgio, 9-11 oktobro 2001 (www.3ips.com)

Nur per Interreto funkcias la pariza www.laboursedesinventions.com.

Kostoj de akiro kaj uzo de patento

Estas multaj elementoj en la kostokalkulo de patento. Dependas i.a. de la dezirata periodo de valideco kaj de la kvanto da landoj en kiuj protekto estas bezonata. Prezkomparo aperis en Monato 11/2000, sed cirkulas multaj similaj (foje kontraŭdiraj) tabeloj. Raportisto emas elekti la tabelon kiu estas plej konvena al lia hipotezo. Estas klare ke patento kostas malpli en granda, unulingva lando kiel Usono aŭ Japanio, dum en aro da malgrandaj, diverslingvaj landoj kiel en Eŭropo la kostoj estas pli grandaj.

EPO dum la pasintaj jaroj jam plurfoje malaltigis siajn tarifon. Krome ĉiuj patentoficejoj aperigas la novajn patentinformojn tra Interreto. La informoj pri malnovaj patentoj en rapida ritmo aldoniĝos. Tiel inventanto kun minimuma sperto kapablas fari supraĵan esploron pri la noveco de sia invento kaj tiel eviti nenecesajn kostojn. En la ĉijara PATINNOVA/EPIDOS-konferenco EPO prezentos programaron kiu gvidas la patentpetanton tra la proceduro.

Necesaj tradukoj por akiri patenton kaj ties kostoj

En multlingva Eŭropo la tradukokostoj estas tikla afero. La laborlingvoj de EPO estas angla, franca kaj germana. Por la nuna eŭropa patento necesas prezenti la dosieron en unu el tiuj tri lingvoj kaj (parte) traduki ĝin en la lingvo de la landoj kie la patento validu.

Ekzistas nesolvebla konflikto inter la oficiala starpunkto de la Eŭropa Unio, laŭ kiu ĉiuj lingvoj estas egalrajtaj, kaj la praktiko, laŭ kiu la angla estas la kutima lingvo por patentaferejoj. Se la Eŭropa Parlamento sekvos la oficialan starpunkton, necesos traduki la dosieron de estonta eŭropa patento en ĉiujn lingvojn de la EU (baldaŭ proksimume 25). Praktike tamen, por esploroj oni nur uzas la anglan version.

La konflikto estis sentebla en la PATINNOVA-intervenoj. Reprezentantoj de la Eŭropa Komisiono diskrete subtenis la egalrajtecon de ĉiuj lingvoj. Reprezentantoj de la industrio nur volis la anglan. Hispana membro de la Eŭropa Parlamento, s-ino Ana Palacio Valleler-sundi, kontraŭis uzon de nura angla lingvo.

Oni eble trovos la solvon en jam ekzistanta proceduro. Por plifaciligi la serĉadon la patentoficejoj jam delonge uzas klasifikajn sistemojn (IPC, EPC), kompareblaj kun NACE-klasifikoj por profesioj aŭ decimala klasifiko en bibliotekoj. Ekzemplo el IPC:

B Transporto

B64C Aviadilo
B64C25 Alteriĝa sistemo

Aldono de unu aŭ pluraj tiaj kodoj okaze de registrado de patentoj ebligas poste rapidan retrovon de tiu aŭ similaj patentoj. Traduko de la patentdosiero al nur la angla (se ĝi origine ne estas en la angla) kaj disponigo de la klasifiko ('keywords', ŝlosilvortoj) en ĉiuj lingvoj ebligas rapidan retrovon de la bezonataj informoj je modera kosto.

Klasikaj kaj interretaj patentejoj kiel riĉa informfonto por interesitaj aplikemuloj

Konsekvenco de atribuo de patento estas ke la detala priskribo de la invento iĝas publika posedaĵo. Resumoj de patentpriskriboj jam ĉiam aperis en specialigitaj revuoj kaj nun ankaŭ interrete. Por entrepreno kiu serĉas iun novan produktoprocedon estas interese serĉi ĉu eble jam ekzistas patento pri tio. Se ĝi trovas utilan patenton, ĝi povas akiri de la patentulo licencon; tio verŝajne kostos multe malpli ol mem ellabori novan procedon. Post periodo 10 ĝis 20 jaroj la patento perdas sian validecon kaj ĉiu ajn povas libere apliki la inventon aŭ procedon.

En sciencaj medioj oni ne sufiĉe konscias pri ekzisto de patentoj. Sufiĉe granda parto de la inventoj tute ne estas novaj, sed jam estas faritaj antaŭe. Eblas ŝpari penon kaj plirapidigi la teknikan progreson per pli bona esplorado de la patentaj datumbazoj. Kelkaj citaĵoj el PATINNOVA:

- 70 % de la teknika scio troveblas en patentoj;
- 70 % de ĉiuj novigaj esploroj estas pluoble farataj;
- 20 % de ĉiuj rezultoj de esploroj jam antaŭe estis publikigitaj.

La Interreto kaŭzis revolucion en la patenta mondo. Baldaŭ ĉiuj patentinformoj de la tuta mondo estos - almenaŭ resume - senpage konsulteblaj per Interreto. Antaŭ jardeko tio estis tute neimagebla.

Tio tamen ne signifas ke agentejoj kaj prizorgantoj de specialigitaj datumbazoj iĝos senlaboraj. Kiel ĉiu uzanto de Interreto scias, sperta uzanto multe pli rapide trovas multe pli uzeblajn informojn. La privataj, specialigitaj datumbazoj havas pli efikajn serĉsistemojn ol la relative simplaj datumbazoj kiuj la oficialaj patentoficejoj disponigas al la publiko.

Konfliktoj pro senrajta patentuzo

Kion faru patentulon kiam li konstatas ke, malgraŭ la protekto de patento, iu konkuranto tamen aplikas la patentitan procedon sen aĉeti la patenton aŭ pagi por obteni licencon?

Triono de la prelegoj de la 1999a konferenco rilatis al tiaj konfliktoj. Por malgrandaj entreprenoj oni proponis asekuron kiu kovru la jurajn kostojn por respektigi la patentprotektion. Oni debatis pri eblaj specialaj juĝejoj por patentaferoj. Iuj favoras arbitracion.

Aldonoj

(Esperanta traduko nur estas se estas ĝenerala interkonsento aŭ se ne eblas miskompreno pri la tradukaĵo)

Listo de la ĉefaj internaciaj traktatoj

1883: Konvencio de Parizo
1970: Patent Cooperation Treaty (PCT)
1973: Munich Convention for European Patents (kreo de Eŭropa Patent-Organizaĵo - EPO)
1975: Traktato de Luksemburgo (pri patentregularo por Eŭropa Unio; ĝis nun ne efektiviĝis)
1994: Agreement on Trade Related Aspects of Intellectual Property Rights (TRIPS, 120 landoj)

Listo de mallongigoj kaj nomoj

BIRPI: Antaŭanto de WIPO
BIX: Business Intelligence Express (kanada serĉilo, ankoraŭ eksperimenta, interrete: strategis.ic.gc.ca/bix)
Derwent: Privata brita firmao kiu laŭ mendo faras esplorojn pri patentoj kaj disponigas patent-datumbazojn al siaj klientoj (www.derwent.com)
DII: Derwent Innovations Index
DWDI: Derwent World Drug Index
DWPI: Derwent World Patent Index
EPC: European Patent Classification (plidetaligo de IPC)
Epidos: Filio de EPO en Vieno, Aŭstrio (1988/1992, postsekvanto de INPADOC)
EPO: Eŭropa Patent-Organizaĵo - Eŭropa Patent-Oficejo (www.european-patent-office.org)
epoline: nova programaro de EPO por asisti al patentpetanto
EPOQUE: Interna serĉsistemo de Derwent
esp(a)cenet: senpage, interreta sistemo de EPO por serĉi patentojn
IIB: Institut International des Brevets (Den Haag, Nederlando) (nun sekcio de EPO kiu esploras la novecon de petita patento)
INPADOC: Gesellschaft zur Errichtung und dem Betrieb des Internationalen

Patentdokumentationszentrums (Vieno, Aŭstrio), nun Epidos, filio de EPO
IPC: International Patent Classification System (kreita de INPADOC)
IPDL: Industrial Property Digital Library (1999, senpaga, interreta servo de JPO pri japanaj patentoj, kun parte informoj en angla lingvo)
IPR: Intellectual Property Rights
Japio: Informservo de JPO
JPO: Japana Patent-Oficejo
MIMOSA: internacie uzata programaro por traserĉi patentinformojn sur CD-ROMo kaj DVD (postsekvanto de Patsoft)
NPB: National Patent Board (Usono)
OBI: Patent-oficejo de Grekio
PAT: Patent Abstracts of Japan (resumoj en angla lingvo de japanaj patentoj)
PATLIB: European Patent Library Initiative
PATINNOVA: dujara eŭropa konferenco pri patentoj (Vieno 1997, Halkidiki 1999, Cardiff 2001)
Patsoft: programaro de EPO por traserĉi patent-datumbazojn (nun anstataŭita per MIMOSA)
PCI: Patent Citation Index (Derwent)
PCS: Patent Classification Service (de INPADOC)
PCT: Patent Cooperation Treaty (Usono, 1970) (administra sidejo ĉe WIPO)
PFS: Patent Family System (de INPADOC)
PTO: Patent and Trademark Office (Usono, 1836) (ankaŭ: USPTO)
Questel-Orbit: Franca kompanio (filio de ŝtata France Telecom) kiu prizorgas patentajn datumbazojn kaj verkas komputilajn programojn por patentoficejoj
TRIPS: Trade Related Aspects of Intellectual Property Rights
USPTO = PTO
WIPO: World Intellectual Property Organization (Genève, Svisio)
WPI: World Patent Index

IKEF-Laborplano 1998 - 2003

En la Ĝenerala Kunveno 1998 en Montpeliero ni akceptis la Laborplanon 1998 - 2000, kiun ni estis ellaborintaj kadre de UEA-kampanjo 2000 por internacia lingva ordo. Tiu laborplano, kiun vi trovas sur la apuda paĝo, enhavas diversajn celtrafajn agadojn (celtrafe en la senco de nia laŭstatuta celo ACKEPTIGI/ENKONDUKI ESPERANTON SUR LA KAMPOJ KOMERCO, EKONOMIO KAJ EKONOMIKO). La estraro tiam elektis specife ĉi tiujn agadojn, ĉar ili havas realisman ŝancon por realigo. Tamen, ĉar multaj el la agaderoj estis ne aŭ nur parte realigitaj ĝis fine de la jaro 2000, la Ĝenerala Kunveno 2000 en Tel-Avivo decidis plivalidigi senmodife tiun laborplanon je tri jaroj, do ĝis fino de 2003. Temas nun pri LABORPLANO 1998 - 2003!

Hodiaŭ mi volas atentigi vin al cifero 1.4.2 f):

Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj

Por tio mi citas el la "Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2000" el "La Merkato" n-ro 72 de aprilo 2001, paĝo 4. Sub la alineo "Verka agado samnivele kiel en la antaŭa jaro" vi povas legi i.a.:

La verka agado, kiu okazas precipe en "Monato", internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo,

kaj

Malgraŭ tiu laŭdinda agado ni devas konstati, ke por grandaj mondpartoj ankoraŭ ne estas kunlaborantoj por "Monato", kvankam loĝas IKEF-anoj tie. Kiu havas talenton por verkado, tiu anoncu sin al "Monato" kiel verkanto (= pagata laboro).

Por ĉiu fakgrupo ŝajnas al mi grava, ke ĝi prezentas sin al la Esperantista publiko per artikoloj pri interesaj temoj el sia fako. Tio aparte validas pri niaj kampoj ekonomio kaj komerco. Mi memorigas nur al gravaj temoj kiel la nova valuto en Eŭropa Unio "eŭro", la rapida kresko de la interreto por la reta komerco, la ekonomia evoluo en kelkaj mondopartoj, ekzemple Usono, Japanio, Eŭropo, la falintaj akciaj kurzoj, la ekonomiaj ŝancoj por instalaĵoj por mediprotektado, la prezpolitiko de petrolproduktantaj landoj kaj multo alia.

Verki artikolon pri tiaj aferoj havas plurfojan avantaĝon: Unue la verkanto devas okupi pri la koncerna temo; el tio li mem multe lernas. Due li devas prezenti tion en sufiĉe bona lingvaĵo, tio estas bona trejnaĵo por li mem. Trie la E-ista publiko ekscias ion pri tiaj aferoj; tio plibonigas la sciojn de la E-istaro pri ekonomiaj faktoj. Kvare oni povas traduki tiajn artikolojn en nacian lingvon kaj prezenti ilin en nacilingvaj gazetoj aŭ revuoj, kun indiko pri preno el Esperanto-revuo. Kvine per indiko "IKEF" al sia nomo sub la artikolo, nia fakgrupo pli konatiĝas. Kiel menciite, la verka agado de IKEF kaj siaj membroj ĉefe direktiĝu al revuo "Monato", sed memkompreneble tio estas nur rekomendo. Artikoloj pri ekonomiaj temoj estas bonvenaj en ĉiu Esperantista magazino, revuo, revueto, informilo k.s. Do ek al la verkado!

Franz Josef Braun, Prezidanto

PS: Verkinte la supran alvokon kaj transdoninte ĝin al la redaktoro, mi ricevis la numeron 6 (junio 2001) de Monato. En ĝi ĉefredaktoro Stefan Maul ĝuste laŭdis IKEF pri nia verka agado. Ĉu hazardo? Aŭ ĉu telepatio? Ĉiukaze pruvo pri la utilo de nia verka agado!

IKEF-LABORPLANO kadre de UEA-Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo
Valideco plilongigita ĝis fino 2003 dum la ĝenerala Kunveno de 28 julio 2000

cif. UEA	speco de agado	responsulo	
		↓ prioritato ↓	
1.4.1	Kampanjo "por pli vasta verdujo"		
	Pligrandigi la membraron de IKEF		
	a) Difino de celgrupoj varbotaj Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko	estraro	1
	b) Difino de membronombro atinginda 200 membroj ĝis fino de 2000 - moto: Ĉiu membro varbu novan membron - sendigi varbleteron tra UEA al ĉiuj UEA-membroj, kies profesio rilatas al nia fako	estraro ĉiuj m.	1 1
	c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio	prez. FJB prez. FJB	1 2
1.4.2	Celtrafaj IKEF-aj agadoj		
	a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj	prez. FJB	1
	b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon	koncernataj membroj ĉiuj	2 1
	c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj	membroj ĉiuj	1 1
	d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj	membroj	1
	e) Terminara laboro	Yamasaki	1
	f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj	membroj k. ĵurnalisma talento	1
2.1.1	Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF		
	a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT		1
	b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retroŝto	ĉiuj membroj	1
	c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto	redaktoro RR	2
	d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako)	Yamasaki S.	3
3.5	Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF		
	a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio	M. Cwik	2
	b) Naciaj ministerioj pri ekonomio	prez. FJB	3
	c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj komercaj altlernejoj	sciencistoj pri ekonomio	2
	d) Komercaj Ĉambroj	membroj kun K.Ĉ.- kontaktoj	2